# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-39 sendita el Budapeŝto la 17an de septembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 77 – kvante modesta sed enhave utila

Tiu Seminario pri Aktivula Maturigo okazis en la 11a de septembro. La komenca prezento venis de Małgosia Komarnica (Pollando), kaj Svetlana Pogorelaja (Ukrainio). Ili gvidas regulajn retkursojn kun sesioj dufoje semajne. Partoprenis en la seminario nur 11 personoj, sed tiuj estas tre regulaj fideluloj por la seminarioj (AMA Reto ☺ ). Sed la malmulteco de prelegantoj (nur du prezentaĵoj sed ses kontribuintoj) lasis tempon por diskutado, kiu levis kelkajn bonajn ideojn.

Gravaj mesaĝoj de Małgosia kaj Svetlana: konsideru ne nur la lingvajn elementojn. La lecionoj aŭ babil-sesioj devas enhavi emociajn momentojn, por tiel kapti la intereson de la kursanoj. Vere brila ideo por la pandemiaj tempoj: la gvidanto mem vizitu belajn lokojn en la urbo kaj kaptu bildojn kaj filmojn per mov-telefono. Tiel la tuta grupo povas kune partopreni virtualan ekskurson al lokoj, kiuj pro la pandemio ne estas grupe kaj fizike alireblaj. Iliaj grupoj konsistas ĉefe el virinoj en pensia tempo aŭ proksima al tio. Konsiderendas, kiel la kursa materialo konvenu por pliaĝuloj - tekstoj havu grandajn literojn kun klara kolordistingo inter la literoj kaj la fono – ideale nigro sur blanko.

La dua prezentaĵo estis de Stefan MacGill pri la bezonoj de juniĝo de la esperantistoj en Eŭropo (kaj, kiel malkovrite) ankaŭ en Azio. La koncernaj ciferoj disiris jam en EKO 38, kaj ilin reprenis la 21a numero de la Kongresa Kuriero 'La Kolombo de Paco'. Tio spronis belan diskuton, interalie pri la graveco proponi membrecon en konvena pakaĵo al dezirantoj.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

EKO logo

**ENHAVO**


- AMO 77 eĥas
- Togolando kaj UTE
- Afriko en Berlino
- Eŭropo projekto
- Greziljono oktobre
- Tamtamo japana

Povas okazi, ke oni devas pagi membrokotizon por la loka klubo, eventuale al regiona instanco, aldone al la landa asocio kaj plie al UEA. Kombinita kotizo por ĉiuj tiuj instancoj (por ne paroli pri faka asocio!) povus altiri homojn, kaj pro la facileco kaj la monŝparado. Kelkaj landoj provetas tion, sed indos vastigi tion.

Alia ideo: tio, kion homoj serĉas, kiam ili decidis eklerni iun lingvon estas la utilo, kiun tiu lingvo alportas. La facileco kaj belsoneco ludas en la decido tre malgrandan rolon. Estis emfazita la valoro kontaktigi lernantojn el landoj kun malsimilaj kulturaj fonoj. Tio portas valoron kaj sencon al la lecionoj, kaj tenas la intereson de la kursoj. Ekzemplo estis regula babilado (tiam per Skajpo) inter kursanoj en Hungario kaj Koreio – kaj foje kun Brazilo.

Tiu 77a seminario estas kredeble la antaŭlasta por 2021, bazita en Eŭropo. La tri pliaj celataj seminarioj okazos en aliaj kontinentoj. La du esperataj seminaroj frue en 2022 same estos ekstereŭropaj. Informoj sekvos, kiam eblos.

SMG

# Togolando rekonsistigas sin

Kunvenis septembre la estraro de UTE kiu relanĉis la agadon de la landa asocio. De nun ĝis la fino de 2021 estas planataj jenaĵoj :

- oftaj estrarkunvenoj
- Korespondado de la estraro kun la membroj de UTE
- informi la membrojn de UTE pri la nova strategio de la estraro
- organizi seminarion por trejni la homojn pri la nova agadmaniero de UTE
- organizi la 28an TEK (Togolandan Esperanto-kongreson)

La estraro kunvenos por daŭrigi la vekon de la esperantistoj togolandaj.

# Afrikanoj loĝas ne nur en Afriko!

Ni prezentis la novan kurson pri energio en futbal-turniro de la afrika komunumo de Berlin.

https://narud.org/11-interkulturelles-fussballturnier/

La enhavo de la instruado estas (germane, france, angle) videbla en la retejo

https://landesstelle.org/de/

Se ekzistus serioza intereso por instruado en Esperanto, eblus produkti tradukojn.

Roland Schnell

# Eŭropo antaŭenpuŝas Esperanton

UEA kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kune kampanjas por antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio kadre de la "Konferenco pri la estonteco de Eŭropo". Ĉiuj utilaj informoj pri la kampanjo troviĝas en UEA-vikipaĝo. Nia celo estas paroligi pri Esperanto en eŭropuniaj politikaj kaj publikaj cirkloj. Tial ni partoprenas la civitanan konsulton de la EU-Konferenco, kiu daŭras ĝis marto 2022. Se por-esperantaj proponoj starigitaj kadre de la civitana konsulto ricevas grandnombran apogon, ni atingas ne nur, ke oni parolos pri ili, sed eble ankaŭ ilian realigon.

UEA kaj EEU specife **petas vin apogi** la proponon 'EU bezonas plibonigitan lingvolernadon - *The EU needs improved language learning'* https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893, kiu pledas por grandskala elprovo de la programo "Multllingva akcelilo" (kun utiligo de la propedeŭtika efiko de Esperanto) en eŭropuniaj lernejoj. Se vi konsentas kun tiu propono, **bonvolu voĉdoni** por ĝi. Priskribo, kiel registriĝi je la EU-platformo (kondiĉo por voĉdonado), troviĝas en la UEA-vikipaĝo. Se vi bezonas teknikan helpon aŭ havas aliajn demandojn, bonvolu skribi al ni: EU-kampanjo@gmx.eu

Klaus Leith, m*embro de la UEA-Komisiono por eŭropa agado, reprezentanto de Germana Esperanto-Asocio en la asembleo de Eŭropa Esperanto-Unio*

*Noto: ILEI, EKO kaj aliaj esprimas sin maltrankvilige pri la kultura taŭgo de la menciita kurso. Almenaŭ la kurso ĉe <lernu.net> donus konvenan alternativon. La verkintoj de la kurso jam ne volas interveni, do la tasko transiras al ILEI kaj aliaj pritaksi la kurson kaj proponi bonigojn. La antaŭa prezidanto de ILEI, Mirejo Grosjean, faris precizan liston de la problemaj punktoj. Tempo jam estas por trakti tion!*

## Greziljono invitas vin al du staĝoj en oktobro

2021-okt-19/24 -- Ĥora (korusa) renkonto de *Interkant* kun *Zdravka Bojĉeva*
2021-okt-18/25 -- BEMI-Semajno de esperantlingvaj biciklistoj kun *Olivier Buisson*
2021-okt-18/25 -- Lingvaj ekzercoj por progresantoj kun *Gunter Neue*
2021-okt-25 / nov-03 -- AŬTUNE, la Esperanto-ferioj por infanoj kun *Elisabeth...*
2021-okt-25 / nov-03 -- Esperanto-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj kun *Szilva Szabolcs, Gunter Neue, Maja Mériaux ...*
2021-okt-25 / nov-03 -- Kurso de sorobano (japana abako) kun *Kimie Markarian*



**BONVENON** en nia Kulturcentro! kastelo@gresillon.org, +33 - 2 41 89 10 34

## Jokohama tamburas rete

Novaĵoj Tamtamas" N-ro 366 (septembra numero) ĵus aperis.

Nia gazeto estas legebla ankaŭ tie: https://www.esperanto.yokohama/novajhoj-tamtamas/

======== vortoj: 905 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.